Wilhelm Busch,

Adele

tradukita de Karl Vanselow

bildrakontoj - aventuroj de fraŭlo

Tuj unue kun rapido
Pro deziro al revido
Serĉas Knopp vizitacele
La loĝejon de Adele,
Arda-kore, juna-aĝe
Ege ŝi adoras lin.
Ne plu vidis unu la alian.
Pri la vana amo sen mezuro
Ofte vekis penson elegian
Ŝia dolĉa bildo sur la muro.
Do demandi volas ŝin Tobias,
Ĉu ŝi jam alie opinias.
Nun ŝvitante, iom timiĝinte,
Kun frapanta koro alveninte
Ŝian pordon frapas li.
“Kia ega ĝojo!” vokas ŝi.
(Malpliiĝas lis ŝvito.)
“Venu, venu, elektito
De sopira mia koro!
Daŭre kun revid-espero
Mi vin tenis en memoro.
Prenu lokon do sur la berĵero!
Jes, anĝelo mia, kredu ĝin,
Ne direble mi amegas vin.”
Knopp anstataŭ amo-apetiton
Pente sentas novan frunto-ŝviton.
Jen, dum timsekundoj tiuj ĉi
En la ĉambron saltas hundoj tri.
“Helpu min!” kriegas la fraŭlin’,
“Karegulo mia, savu min!”
Ne atentinte la teruran vokon,
Ne atendinte ŝian pluan diron
Tobias forlasinte jam la lokon
Daŭrigas la edzin-serĉadan iron.
Malhelpis tiun ŝanĝon de l’ afero
Eĉ ne la sida loko sur “berĵero”.

. . .

Traduko de la Germana poemo "Eine alte Flamme" de Wilhelm Busch *(∗1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-1054-2139 (2014-06-19 20:01:33)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto", eldonita de Karl Vanselow. Pri tiu vidu la retejojn `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`*, ankaŭ:* `http://vanselow.wikispaces.com/`*.*